

Literatura Mondo, 5-a parto: La unua felietona teksto :
Paŭlo Lengyel: *rememoroj*
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 631, 1975.11.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la aŭtunaj monatoj ni trafolumos kun vi la epokfaran revuon ***Literatura Mondo***.

A.- La unua folietona teksto, kiun publikigis ***Literatura Mondo*** ekde la unua numero estas *rememoroj* de ***Paŭlo Lengyel***, kiu estis dum jaroj redaktoro-eldonanto-presanto kaj administranto de la revuo ***Lingvo Internacia***, antaŭulo de ***Literatura Mondo***, ankaŭ eldonita en Hungario. Paŭlo Lengyel fondis kun sinjoro ***Fruictier*** la eldonejon ***Presa Esperantista Societo***. Tiam li disvendis en 1904 sian presejon kaj elmigris en Parizon kun sia familio kaj kun preshelpanto. Li rakontas pri la laboro en la nova presejo, kie li pasigis dek jarojn en vera atmosfero esperantista, pri la pretigado de la Pariza Kongreso en 1914, kiu bedaŭrinde neniam okazis, ĉar venis la mondmilito.

Cl.- Tiam kvin jarojn li pasigis en malliberejo, kune kun sia familio ! Kiam la milito eksplodis, la franca registaro alvokis ĉiujn germanojn, aŭstrojn kaj hungarojn loĝantajn en Francio, ke ili tuj prezentu sin al speciala magistrato por esti internigitaj por la daŭro de la milito. Oni konfiskis lian tutan havaĵon : ne nur la monvalorajn objektojn, kiel mebloj, litilaro, vestaĵoj, biblioteko, ktp., sed ankaŭ la familiajn relikvojn, portretojn, skribaĵojn, dokumentojn, ĉion, ĉion ! En ***Châteauroux***, kie li kaj liaj familianoj estis unue malliberigitaj, la UEA-delegito sinjoro ***L. Moreau*** penis mildigi ilian malfeliĉon. Helpon li ricevis de ***Théophile Cart*** kaj de ***Hector Hodler***.

A.- Inter la malliberuloj li vane serĉis esperantiston. Nur inter la soldatoj gardantaj la ejon li trovis du samideanojn. La soldatoj konsideris la malliberulojn malamikojn. Sed la du esperantistoj tuj amikiĝis kun la familio ***Lengyel***. Kaj ***Paŭlo Lengyel*** skribas : « *Ili faris en nia intereso, kion ili povis. [...] Ja ! Esperanto ne estas nur lingvo ; ĝi estas io alia. [...]* »

Cl.- En junio 1919 lia mallibereco finiĝis ; oni transportis la familion ***Lengyel*** en Budapeŝton, kaj ***Paŭlo Lengyel*** malgraŭ sia malsana stato kaj granda mizero tuj rekomencis sian poresperantan laboron partoprenante en la redaktado de ***Literatura Mondo***.

A.- Post tiu ĉi senpretenda, sed emociiga biografia raporto de ***Paŭlo Lengyel***, komencis aperi felietone en junio 1923 la romano ***Modernaj Robinzonoj*** de ***Teodoro Schwartz***, ĉefredaktoro de ***Literatura Mondo***. Tiu ĉi militkaptita raporto eble valorus reeldonon. Ni hodiaŭ citos kelkajn erojn el ĝi :

Cl.- « *Mi estis 18-jara, kiam mi estis devigita komenci la soldatan vivon kaj nun 24 jarojn mi povas kalkuli por mi. Kiu redonos mian junecon perditan ? Kion fari ? Kien iri ? Kion ? Ien ajn, nur rifuĝi for el tiu ĉi muelejo, kie oni frakasas homajn animojn. Rifuĝi kaj flugi al la libera aero, al malproksima lando, kie atendas nin ama ĉirkaŭpreno de niaj gepatroj, fianĉino. [...]* Kaj jen naskiĝis la penso pri forkuro. [...]

A.- En Siberio restis sola la japana armeo kaj per mejlaj paŝoj proksimiĝis la ruĝa armeo. La 10-an de februaro 1920 ĝi atingis kaj okupis Irkutsk-on, la ŝlosilon de Mongolio. Ni, inertaj malfeliĉuloj, atendis kun kortremeto la renkontiĝon de tiuj ĉi du gravaj kolosoj. Nek pro la

sorto de Siberio, nek pro la milita bonŝanco de iu ajn armeo el la du malamikoj, sed pro nia propra vivestonto regis la malpacienco, miksa kun komprenebla timo. [...]

C.- « Klaĉaj babilaĵoj, batalkampaj raportoj, kiujn la tro ekscititaj pesimistoj kaj optimistoj mem disvastigis inter ni, kvazaŭ kinematografe montris la grandan teatraĵon, de kiu dependis ankaŭ nia sorto. Fine ĉiam pli kaj pli firmiĝis la famo, ke en sovjeta Ruslando ne ekzistas plu militkaptitoj, ĉar la tiea registaro repatrujigis ilin jam antaŭ longe. [...] Ho kiom da larmoj, suferoj kaŭzis tiu ĉi falsa informo ! Kiom da homaj vivoj estis estingitaj poste pro tiu ĉi bonintence farita konsolo ? [...] Sed ni kredis la verecon de tiu kaj... decidis...

A.- Kaŝe ekbrilis la okuloj de kelkaj samsortanoj kaj ĉiutage kreskis la nombro de tiuj, kiuj flustre demandis unu al alia : « Ĉu ankaŭ Vi ? » Oni facile komprenis, ke pri baldaŭa forkuro aludas la parolanto. La respondo estis simpla, kiel la demando, sed akompanata de dolĉespera rideto : « Ankaŭ mi ! » [...]

Cl.- Ekstere grincis la 40-grada frostoj, sed interne en la kriptoj ni atendis kun senpacienca espero – la reviviĝon. [...]

A.- La forkuro nur en la unuaj tagoj de marto povis okazi, ĉar, kiom ajn ili sopiris je libereco kaj freŝa aero, la februaran salajron oficiran... neniu estis volinta lasi en la ŝtatkaso de Japanio. – Kiu scias, por kia celo estas utile, se almenaŭ iom da mono estas en la poŝo ! – pensis ĉiu forkuronto. [...]

Cl.- La trian de marto 1920 matene ĉion, kion mi opiiis oportune aŭ uzebla, mi kolektis en tornistran, kaj mian malgrandan kapitalon (110 jenojn) metinte en monsaketon sub la ĉemizo, kaj notinte adreson de kelkaj kamaradoj por sciigi iliajn parencojn post mia alveno, mi komencis la plenumadon de l' decido. [...] Mi, kune kun du kamaradoj, per helpo de falsigita por-tendara pasporto, forlasis la tendaron malbenitan. Kompreneble estis kelkaj, kiuj pli romantike aranĝis la forkuron. Ili ŝtele elrampis sub la dratbarilo aŭ sin kaŝis en la balaafveturilo forportota. [...] »

*A.- La venontan semajnon ni legos al vi kelkajn erojn el la dua felietono de **Literatura Mondo**, tiel vi eble dezirus kegi pli pri la verko **Modernaj Robinzonoj** de **Teodoro Schwartz**.*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!